



# Pribina

Sabato, 30 julio 2016

N-ro 7



## Esperanta preskaŭ venko en futbalo



La esperanta futbalteamo preskaŭ gajnis sian trian matĉon kontraŭ loka Nitra teamo ZMOS en jaŭda vespero. La rezulto estis 4-5 kaj la venka golo de la kontraŭulo estis farita en la lasta minuto.

Esperanta teamo tenis la pilkon admirinde multe en sia posedo kaj temas pri la plej bona el la ĝisnunaj tri matĉoj de "Esperanto". Pasintjare en Bon-Aero la esperanta teamo perdis 4-0 nur dum unua duontempo.

Tri golojn por esperanta teamo faris Padro Paulo Freitas el Brazilo.

## Aŭkcio portis al UEA preskaŭ 1500 eŭrojn

La kongresa aŭkcio kun bonega gvidado de Humphrey Tonkin portis al UEA ĉ. 1450 eŭrojn. La plej alta prezo estis ĉe la kongresa numero 1 de la sekva UK en Seŭlo, kiu kostis 350 eŭrojn, kaj la dua plej multekosta estis la kongresa numero 102 de la sekva kongreso, kiu kostis 150 eŭrojn.

Post tiuj nemateriaj varoj plej altajn prezojn atingis binditaj jarkolektoj de revuoj, el kiuj pintis la jarkolekto de revuo Esperanto el la jaro 1920. Inter libroj la plej altan prezon havis memoroj de Teo Jung "Ĉiu ĉiun" kun dediĉo de la aŭtoro, kiu kostis 45 eŭrojn. Multaj aliaj libroj restis en prezoj sub 20 eŭroj.

## Komitato de UEA ŝanĝis statuton

En sia vendrera kunsido la komitato de UEA akceptis ŝanĝojn al la statuto de UEA, kiuj dum la venonta aŭtuno estos fine akceptataj per ĝenerala voĉdonado inter la membroj.

La komitato ankaŭ akceptis juran sendependiĝon de TEJO kaj kunlaboran kontrakton inter UEA kaj TEJO. Elektiĝis ankaŭ financa komisiono de UEA en kiu nun membras Osmo Buller (30 voĉoj por), Huang Jingbao (Trezoro, 30), Nico Huurman (28) kaj Fernando Maia (33). Entute estis 37 validaj voĉoj. Post sia emeritiĝo kiel ĝenerala direktoro Osmo Buller estas nun elektita al la komitato kiel komitatano C.

## Slovakio invitas por revizito

Ĉu vi ŝatis la 101-an Universalan Kongreson? Ni ene de LKK esperas, ke jes!

Se vi emus reveni al Slovakio por alia esperantumado, ni havas jam por vi jenajn proponojn:



### KAEST 2016

Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko okazos en Modra (nur 25 km de Bratislavo), 17.- 20. 11. 2016. La ĉeftemo estos: "Avantaĝoj kaj obstakloj de moderna komunikado". Aliĝu kaj partoprenu aŭ eĉ mem kontribuu kaj prelegu!

<http://kaest.ikso.net>



### Poludnica 2017

En la jaro 2017 (5. - 8. 1. 2017) okazos jam la 35-an fojon Internacia renkontiĝo de vojaĝantoj-esperantistoj.

Ĉeftemo ĉi-jara: GEOKAŜADO.

Detalojn serĉu ĉe:

<http://poludnica.esperanto.sk>



### SES 2017

Somera Esperanto-

Studado – jam la

11-an fojon okazos somere en 2017 la plej granda somera E-lernejo.

Venu do ankaŭ ontjare al Slovakio lerni kaj praktiki Esperanton!

La loko estos precizigita baldaŭ, serĉu detalojn ĉe:

<http://ses.ikso.net>

# Nitre kune kantis ni

Por la UK en Nitro 2016 la prizorganto de la aktuala Internacia koruso, Franz-Georg Rössler, kreis kelkajn novajn esperantlingvajn kantojn, kiuj aparte bone kongruas kun la esperantista kaj la regiona etosoj.

La titoloj "Super montoj fulmotondro laŭte vokas" kun la refreno "Por liber' luktu ni, por la ver', por la Espero ni laboru!", "Kongreso en bela Nitro" kaj la kanono "Nitre kune kantu ni en perfekta harmoni': Esperanto!" bone plaĉis al la korusanoj entuziasme kantantaj kaj al la kunvenintoj en la koncerto vendrede. La muziknotojn - kolektitaj en pli ampleksa volumo - ricevas donace la urbestro de Nitro kaj LKK. Konservas ilin la arkivo de UEA por la memoro kaj por estontaj eventoj.

Parto el tiuj kantoj prezentiĝis ankaŭ sabate en la salono Zamenhof. Gvidis la koruson Rita Rössler-Buckel, la unua dirigentino en la Solena fermo.

KN 625

## Ĵurnalista vidpunkto

Post transepto merkredo, en ĵaŭdo 28. 7. okazis kelkaj profesiaj prelegoj kaj libertempaj okazaĵoj. La prelegoj: Muziko en Slovakio, Libro de La Printempo, Oratoraj konkursoj, La Akademio de Esperanto, kiel ĉiam bonegaj koncertoj, ktp. De mia perspektivo, komitatano de Kongreso por presaĵo kaj amaskomunikila servo estas nia kongreso promociita tre bone. Kvankam parto de la nacia slovakaj kaj fremdaj amaskomunikiloj montras malpli da intereso, ol ni povas atendi de mia ĵurnala sperto. Mi scias, ke nia kongreso, la unua de sia tipo en nia lando, postulos longan tempon por skribi kaj aŭdi. Krom internaj elsendoj de Esperanto-radioaparato kaj videokanalo Verda Stacio, la tutan trapason de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto en Nitra dokumentas regiona televido Nitrička <http://www.tvnitricka.sk/> rigardata de spektantoj ĉie en Slovakio. Plurajn amaskomunikilraportojn transprenis de ni novaj agentejoj kaj tiel ili disvastiĝis. Preskomunikiloj ĉeestis gazetarajn konferencojn por la kongreso kaj ĵaŭde ni bonvenigis redaktoron de la slovakaj Radio Regina - nia amaskomunikila partnero de la Kongreso Dr. Iveta Pospíšilová, kiu Esperanton iam lernis kaj tial ne devus esti granda problemo por komuniki. La registrado estos disponebla ĉe: <http://www.nitra2016.sk/uk-en-gazetaro/> kie vi povas legi ĉiujn artikolojn pri la kongreso. Sinjorino redaktorino estis entuziasma pri la etoso, kiu triumfas inter ni en la premisoj de la Universitato de Agrikulturo en Nitra. Interalie, ŝi lernis ion pli pri la historio de Esperanto pere de Dr. Petr Chrdle kaj Ing. Jan Vajs. La amaskomunikilo ne mankis dum vendreda programo - je la Malferma Tago, kaj Libroservo kaj aliaj bonegaj okazaĵoj... Danke al TV Nitrička la kongresanoj povis preni fotojn ne nur de la lando, sed ankaŭ de la aero uzante virabelon. Amaskomunikiloj certe ne mankos ĉe defilado aŭ provo pri slovakaj rekordo en dancado de slovakaj tango ekster la Teatro de A. Bagar sur Svätopluka placo. Ni dankas al TV Nitrička, MY Nitrianske noviny, Galéria MLYNY Nitra, RTVS, Rádio Regina, Reportér 24, Nitralive kaj Noviny Poprad por

amaskomunikila subteno. Maratono de prelegoj, koncertoj, kursoj, vojaĝoj kaj junularaj okazaĵoj, kune kun interesaj konferencoj estos kompletigita per sabata Ferma ceremonio de la kongreso.

Mi kredas, ke la la 101-a Universala Kongreso de Esperanto en Nitra restos en la plej bonaj rememoroj...

Zlatica Gregorová, KN 196

## Travivaĵo kun polico

Ĉar mi loĝas ĉ. 15 km okcidente de Nitro, mi volis iri el stacidomo de Alekšince. Sur strato veturis kontraŭ mi aŭtomobilo kun du policistoj kaj haltis apud mi. Policistoj postulis mian legitimilon, demandis, kion mi volas, kie mi loĝas, kion mi faras ĉi-tie. Post kelka cerbumado mi devis eniri en aŭtomobilon: la policistoj servis kaj transportis min al stacidomo. Mi diris "Multan dankon" en la slovakaj.

Ulrich Wilke KN 1225

## Nitra leciono

Iam antaŭ nia tempo kulpis petolema preskoboldo, kiam io en la komunikado ne funkciis ĝlate. Nuntempe anonima "teknika problemo" povus plene nuligi prelegon. Plurfoje tio okazis dum la kongreso. Honeste estu dirate, ke nek UEA, nek LKK, eĉ ne grizhara preleganto kulpis. Evidente nur tiu supera instanco persiste ne volis funkcii.

Tiel (nur unu ekzemplon) okazis dum la prelego pri la regiona muziko en salono Hodler, kie la preleganto jam frumatene amikiĝis kun la teknika prizorganto kaj la aparataro kaj post duona horo konstatis: En ordo ĉio, kaj mi eĉ kapablas prezenti, stiri, regi bildojn kaj muzikaĵojn samtempe.

Sed dum la prezentado mem longe la bildoj ne volis aperi, kaj baldaŭ la laŭtparolilo perdis sian voĉon. La majstro de la aparatoj, studinta komputila teknikisto, provis dumprelege persvadi la maŝinaron al kunlaboro, sed vane.

Ja mankis la muzikaj ekzemploj. Sed la preleganto ne bezonis akustikan plifortigon de la propra voĉo. Kaj li simple per intensigo de la prelega prezentado kapablas transponti la malĉeeston de la teknikaj helpiloj.

La homo ĉiam ankoraŭ estas la mastro de la iloj, se li ne facilanime transdonas la proprajn kapablojn al la maŝinoj. Ne fidu al la tekniko, nur fidu al vi mem!

KN 625

## Naŭ demandoj pri lingva justeco en la fakliteraturo

La ĝustaj respondoj de la ekzameno de nia AIS-kurso estis la jenaj:

- |            |            |            |       |
|------------|------------|------------|-------|
| 1) a, b, d | 4) a, b, d | 7) a, b, d | 10) c |
| 2) a, b, d | 5) a, b, d | 8) a, b, d |       |
| 3) a, b, d | 6) a, b, d | 9) a, b, d |       |

Kiel dirite, la ekzameno estis malpli malfacila ol tiel, kiel ĝi aspektis.

Xavi Alcalde, KN 631

# Eŭropa komisiono tamen kunvenis

Malgraŭ ĉio okazis la kunveno de la Eŭropa Komisiono de UEA dum la UK 2016 en Nitro. La salono ne estis mendita antaŭ la kongreso, la kunveno tial ne aperis en la kongreslibro, kaj lastminute ŝanĝiĝis la salono, al Zvara.

Tamen kunvenis dekkvino da homoj por informiĝi pri la plej juna el la regionaj komisionoj de UEA: komenco, konsisto, rilatoj kun EEU, ĝis nuna agado, laborplano. Fine venis pluraj proponoj, ideoj kaj demandoj pri la estonta laboro de la komisiono kaj la rilatoj kun la estraro de UEA.

Aleks Kadar KN 817

## Raporto pri teatraĵo *Tuŝoj je animo*

Unika scenej-muzika spektaklo preparita speciale por la UK okazis dufoje dum la marda vespero en la Teatro de Andrej Bagar en Nitro. La poemaro "Dotyky duše" de slovaka verkisto Jozef Leikert, eksa parolisto de la prezidento, en Esperanta traduko "Tuŝoj je animo" de bratislava esperantistino Anna Ivaková, prezentiĝis en formo de dulingva deklamado kaj kantado, akompanata per muziko kaj baleto danco.

Ambaŭfoje venis spekti ĝin po proksimume 150 kongresanoj. Laŭ la impresoj de iuj, la kombino de pluraj artaj formoj kaj lingvoj bone transdonis la mort-proksiman meditado pri spiriteco kaj beleco, kiu devenas de propra travivaĵo de la aŭtoro. La spektaklon organizis entuziasma grupo de personoj, el kiuj tute ne ĉiuj konis unu la alian, sed ĉiuj provizis al ĝi sian specifan talenton.

Krom la jam menciitaj temis pri elstara ĉeĥa zimbalonistino kaj kantistino Zuzana Lapčiková, dancistoj de la Nacia teatro en Brno Markéta Habalová kaj Michal Pimek, profesia slovaka aktoro Jozef Šimonovič kaj la ĉeĥa esperantisto Marek Blahuš, kiu publike deklamis poezion la unuan fojon.

Muzike akompanis la spektaklon tri pliaj ĉeĥoj kaj ĝian ĥoreografion kunkreis Hana Litterová. Komunaj provludoj okazis dum la du antaŭaj posttagmezoj, antaŭ kaj post la spektaklo informis pri ĝi priartaj radioelsendoj en Ĉeĥio kaj Slovakio.

Raportis: Marek Blahuš, KN 438

## 27-a OSIEK-konferenco en Osijek

En la kroata ĝemelurbo de Nitra, Osijek, antaŭ la 101-a UK, (16-22.07.2016) okazis gravdecida, la 27-a IEK, Internacia Esperanto Konferenco de porkultura asocio OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj).

Pri la temo "Landoj ĉe vojkruciĝo" prelegis M. Butan, Nedeljka Lozajic, G.Mihalkov, Spomenka Štítnec kaj Zlatko Tišljar. Bonfarte, en "sia" urbo, entuziasmitaj de

la naturo kaj kulturaĵoj de la urbo kaj la regiono Slavonija, OSIEK-anoj trovis novajn vojojn por la pluirado de sia organizo.

Por la nova prezidanto estas elektita entreprenisto, "deĉiama" OSIEK-ano Pal Kozsuch, (HU), laŭ kies propono la venontaj IEK-oj okazu kun aliaj, pli grandaj aranĝoj, sinapoge kaj samtempe apogante ties kulturen programon kaj, precipe, komencantojn serĉantajn la postkursajn utilojn de Esperanto. Inter la proponitaj aranĝoj troviĝas ankaŭ la fama somera SES en Nitra.

La tradician literaturan OSIEK - premion por la plej valora verko de vivantaj aŭtoroj, per la sekreta voĉdonado, la membroj preskaŭ unuanime aljuĝis al la "Historio de la Esperanta literaturo" de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer, eldonitan en 2015 de Kooperativo de Literatura Foiro.

La Konferencon, por la kvaran fojon, organizis la firmao Orbis Pictus, estrata de osijekanino kaj OSIEK-anino, Visnja Brankovic. Parto de la prelegantoj, komitatanoj kaj membroj de la 27-a OSIEK kontribuas kaj partoprenas ankaŭ en la 101-a UK en Nitra.

Visnja Brankovic,  
teknika organizanto de IEK en Osijek

## Saluto de SAT al la 101-a UK

Karaj geamikoj,

Mi salutas vin je la nomo de Sennacieca Asocio Tutmonda. SAT estas renkontiĝejo por malsamdeanoj, kiuj pretas interŝanĝi en tolerema etoso pri diversaj manieroj konstrui mondon sen subpremo kaj sen homekspluatado.

Konkrete, SAT eldonas la dumonatan gazeton Sennaciulo, kiu ekde la maja-junia numero fariĝis tutkolora. Ĝi ankaŭ eldonas la Plenan Ilustritan Vortaron (PIV). Ĝia reta versio, konsultebla en la paĝaro "vortaro.net", estis pretigita dank' al la kunlaboro kun la asocio E@I, kaj ni diskutis pri perspektivoj por la plua evoluigo de tio dum la pasintjara kongreso brile organizita en Nitro de la skipo al vi konata.

Alia grava eldonaĵo de SAT-EFK dum la lastaj jaroj estis la dokument-filmo "Esperanto" de Dominiko Gaŭtiero, pri kiu ducent ekzempleroj senpage estas disponigitaj dum tiu ĉi kongreso por helpi al ĝia utiligo flanke de Esperantistoj el nepagipovaj landoj.

Dankon pro via atento. Havu agrablajn kaj fruktodonajn kongrestagojn!

## La katalogo *Trovanto*

Pri la Esperanto-muzeo en Vieno prelegis s-ro Bernhard Tuidier. Ĉiun materialon oni devas unue konservi kontraŭ ŝimado pro acida papero, koverto aŭ skatolo. Poste necesas la materialojn ordigi kaj katalogigi kaj informojn pri ili publikigi en la serĉilo Trovanto. Plie la kopirajte liberajn materialojn oni skanas kaj eksponas en la muzea retejo, nome inkunablajn librojn, revuojn, fotojn. Ĝis la jaro 2025 la muzeo planas eksponi en sia retejo sian tutan riĉaĵon.

# Ekskurso al Banská Štiavnica

Unu el la merkredaj ekskursoj – E1 – direktis al Banská Štiavnica, kie oni promenis tra la urbo kaj vizitis tri kastelojn, inkluzive de la eksterurba kastelo Svätý Anton, kiu apartenis al la nobelaj familioj Koháry kaj Coburg. Tie la juna loka ĉiĉeronino nur meze de la vizito plene ekkonsciis, ke ŝi gvidas samtempe grupon de homoj el 16 landoj kaj ke Esperanto estas ne nur ia nia nomo, sed ĝuste tiu lingvo, en kiu ni ĉiuj interparolas. Ŝi opiniis tion mirinda – same kiel la fakton, ke estroj de la grupo, kiuj ŝiajn klarigojn en ĝin interpretas, estas franco kaj ĉeĥo – do ke fakte tute forestis en la grupo slovakoj kaj ŝi tamen interkompreniĝas kun tiom bunta aro de homoj, mem laŭ propraj vortoj nesukcesinta ellerni ajnan fremdlingvon. Mi mem estis nur helpanto dum tiu ekskurso, ĉar plejparton de la interpretado prizorgis Matthieu Desplantes – juna franca esperantisto, kiu dum kelkajara restado kiel volontulo kaj dungito en la esperantista oficejo de E@I en Partizánske ellernis tiom bone la slovakon, ke necesis helpi al li nur malofte. Gratulon!

Cetere, la organizo E@I, estrata de la LKK-prezidanto Peter Baláž, daŭre serĉas volontulojn – legu pli ĉe <http://blog.ikso.net/>

Raportis: Marek Blahuš, KN 438

## Esperantologia konferenco pri lingvoevoluo kaj Zamenhof

La 39-a esperantologia konferenco okazis en vendra posttagmezo en salono Kalocsay kun partopreno de ĉ. 80 aŭskultantoj kaj prezentantoj. Okazis vigla diskuto post ĉiuj prezentoj.

Federico Gobbo analizis ŝanĝiĝon de esperanta vortordo, laŭ unu ekzemplo, nome la uzo de “lingvo internacia” aŭ “internacia lingvo”. Zamenhof uzis preskaŭ entute la formon “lingvo internacia” kaj ĉar lia lingvouzo estis prestiĝa ĝi aperis kiel modelo en la komenca tempo de esperanto. La formo “internacia lingvo” komencis oftigi unue en SAT kaj iom post iom la vort-ordo “lingvo internacia” estis konsiderata pionir-stila kaj ne plu moda. Nuntempa uzo en esperanta gazetararo preskaŭ ekskluzive uzas formon “internacia lingvo” kaj la formo “lingvo internacia” aperas nur kiam oni referencas al frutempaj tekstoj.

F. Lo Jacomo okupiĝis pri la demando, ĉu Esperanton necesas evoluigi - certe jes, ĉar ĉiu viva lingvo evoluas. S-ro Christer Kiselman prezentis la klopodon de Zamenhof verki gramatikon de la jida “jargon”, kiu estis en lia tempo parolata, sed ne havis gramatikon. Zamenhof uzis modernan lingvistikan metodon, kiun li poste aplikis ankaŭ ĉe Lingve universale kaj poste ĉe Esperanto mem. Maria Rosaria Spáno parolis pri la engaĝiĝo de Zamenhof en la hebrea movado, por kiu li verkis plurajn artikolojn sub la nomo Gomo sum (Homo sum - Mi estas homo). Li kredis, ke la hebrea naciŝtato povas sukcesi nur en Usono. Adriana García Gutiérrez el Kubo priskribis ontologiajn laborojn pri organizado de inform-scienco kaj terminologio en Esperanto.

## Alvoko por komuna informkampanjo

La pasintmonataj okazaĵoj montris, ke la nuna tempo tre taŭgas por informi pri Esperanto, ĉar homoj multe pli ol antaŭe interesiĝas pri lingvaj demandoj, ĉefe en la landoj de Eŭropa Unio, sed ne nur.

La skizo de la plano de UEA kaj TEJO estas helpi la informadan agadon pri Esperanto kunordigante kaj proponante rimedojn bezonatajn por tion efike fari. Por la kunordigado ni serĉas ĉefkunordiganton, kunordiganton de tradukantoj, kiel eble multajn tradukantojn, grafikumantojn, disvastigantojn, homojn, kiuj ŝatus kunlabori por tiu celo.

Skribu al [briteliro@co.uea.org](mailto:briteliro@co.uea.org) (laŭeble ĝis la 15-a de aŭgusto 2016) indikante pri kia supra rolo vi interesiĝas, kaj vi estos invitata al laborgrupo por kunlabori por laŭeble plej taŭga utiligo de la situacio por plibonigi la konatecon kaj prestiĝon de Esperanto.

Ni planas, ke la kunordigado okazos ĉefe interrete. Por tiuj, kiuj partoprenos la Universalan Kongreson en Nitro, estos specifaj programeroj dediĉitaj por paroli pri la temo kaj kunordigi niajn fortojn por bone kaj daŭripove utiligi la ŝancon, kiu malfermiĝis al ni.

(Laŭ gazetara komuniko de UEA)

## Limeriko post *La kredito*

Spektaklo pri banka kredito  
kun multa komika profito:  
Georgo kaj Saŝa,  
intrigo ĉantaĝa,  
kaj, neeviteble, kokrito.

Russ Williams KN 511

## Redakcia grupo dankas

Redakcia grupo dankas pro kunlaboro kaj raportoj. Ni ne povis aperigi ĉiujn kontribuadojn kiujn vi sendis por la kuriero sed granda parto de ili povis aperi. Ni pardonpetas pri kelkaj malfruoj en apero de artikoloj, eraroj kaj ankaŭ pro tro malgranda eldonkvanto de unuaj tri numeroj. La numeroj de kuriero troveblas ankaŭ en reto ĉe retejo de UEA, [www.uea.org/kongresoj](http://www.uea.org/kongresoj).

Jukka Pietiläinen  
Edoardo Nannotti  
Miroslav Malovec  
Pavol Petrik

**Elŝutu la ciferecan  
version de Pribina!**

Fotu la jenan kodon per  
via poŝtelefono por elŝuti  
tiun ĉi kaj la aliajn  
numerojn de la Kongresa  
Kuriero.

